**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2001**

**NEKROLOGO**

José Mª. González Aboín forpasis en Madrido la 23an de septembro de 2000. Li estis Dumviva Patrono de UEA, Dumviva Membro de Hispana Esperanto-Federacio kaj prezidinto de Madrida Esperanto-Liceo. Li esperantiĝis ĉirkaû 1960 kaj aktive partoprenis en la organizado de la U.K. de Madrido en 1968. Kutime li ĉeestis Univrsalajn Esperantajn Kongresojn kaj kiel geografa inĝeniero li reprezentis Hispanion en internaciaj komisionoj, inter ili de Unesko pri geografistoj, kie li proponis la oficialan uzadon de E-o kiel internacia lingvo por geografiaj nomoj (la Danubo havas pli ol 8 malsimilajn nomojn). Li estis kolektanto de vortaroj de cxiuj lingvoj, inter ili multaj de esperanto. Li pace ripozu.

**UNIVERSITATA KURSO**

La Universitato de La Laguna, Fakultato pri Filologio, Departementoj de Angla kaj Germana Filologioj organizas kurson pri "Enkonduko al esperanto kaj ĝia kulturo". Direktoro Alejandro F. López de Vergara. Invititaj profesoroj: membroj de la Esperantista Societo de Tenerife.
Dato: De la 19an de februaro ghis la 8an de junio. Universitataj Kreditoj: 3 (30 instruhoroj).

**ĈE UEA**

Laŭ statistikoj de la lastaj 50 jaroj, Jorge Camacho aperas inter la 10 aŭtoroj pli premiitaj en la Belartaj Konkursoj kiu ĉiu jare organizas UEA: 13 premioj plus 3 mencioj inter la jaroj 1989-99
Kataluna Esperanto-Asocio ricevis 250 eŭrojn kiel subvencio de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. UEA pagos en libroj por la biblioteko de la asocio.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Por la periodo 2001.2010 oni renovigos la trionon de la membroj. Inter la proponitaj de almenaŭ kvin akademianoj, ĉiuj varolaj verkistoj kaj publicistoj, aperas kelkaj hispanoj: Miguel G. Adúriz, Miguel Fernández kaj Abel Montagut.

ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

En la plej granda matena gazeto de Svedio "Dagens Nyheter" 200-09-28), la estro de la Polico verkis artikolon kie li porponas ke oni limigu al kvar la nombron de lingvoj en la EU, kaj ke neniu rajtu paroli sian propran lingvon. Tiel ĉiu estos devigata paroli alian lingvon ol sian propan. En la sama gazeto respondas (2000-10-04) aktivulo de TEJO pere de letero laŭ la rubriko "Unu sola lingvo sufiĉas por EU".

La tag-ĵurnalo "La Voz de Avilés" de 28-01-2001dediĉas trionan paĝon por prikomenti la ĵusan aperon de la 25a numero de "Antaûen", revuo de la Avilesa Esperanto-Grupo. La komentoj estas klare favoraj al la internacia lingvo.
Je la komenco de februaro, en la programo “La enciclopedia de la vida”, Radio Isla, loka radio de Tenerife, intervjuis al la Prezidantino kaj aliaj membroj de la Esperanto-Societo de Tenerife.

“Radio Economía” de Bilbao intervjuis al J.Mª Iturrioz dun preskaû duon horo, li parolis pri la e-movado en Bilbao, kursoj, ktp. “Radio Euskadi” elsendis 20-minuta intervjuo al Marcos Cruz laû la ĉafa temo esperanto kaj interrreto.

**60a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO** San Javier (Murcia), 22a ĝis 30a de junio 2001. Kongresejo: Centro Cívico de San Javier Parque Almansa. Kongresa Sekretario: Vicente Sanchez Lumbreras. Saturno 15. ES-30730 San Javier (Murcia).

Tel: 968192598; 968191243; 968183338; 968190588.
Retadreso: vsal0001@almez.pntic.mec.es
**KOTIZO**: Kongreskotizoj en pesetoj: ĝis la 30a de Aprilo: 5.000 Poste: 5.500. Kotizu pere de BBVA, konto-numero: 0182-3203-57-0200015978; al la 60a Hispana Esperanto-Kongreso; ES-30730 San Javier (Murcia). Kunsendu la pagpruvilon kaj la aligxilon al la suba adreso. Por bankcxekoj kaj posxtmandatoj aldonu 10% La kotizo estas ne repagebla.

**NIA VOĈO** **MARTO 2001** 1999

**HEF ANGULO**

NOVA TTT-PAĜO DE HEF
*www.esperanto-es.net*

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.net

**KARAVANO AL LA UK EN ZAGREB**
Grupo Esperanto de Valencia organizas karavanon por ĉeesti la UK-n en Zagreb (Kroatio). Ekzistas du eblecoj:
1.- AVIADILE: Eliro el Valencia la 20a de Julio. Alveno en Valencia la 29a. Prezo aviadilo + loĝado en Zagreb: +/- 90.000 pesetoj. Rezervitaj 10 biletoj
2.- AÛTOBUSE: Eliro el Valencia la 19a de julio. Alveno en Valencia la 31a. Prezo aûtobuso + loĝado survoje kaj en Zagreb: +/- 80.000 (ebleco viziti inter alie Venezion kaj aliajn interesajn lokojn, survoje kaj en Kroatio). Minimume 25 vojaĝantoj.
Fina prezo dependas je la kvanto da aliĝantoj. Tiuj kiuj deziras iri per aviadilo devas tuj mendi, ĉar temas pri prezo por grupoj, kaj rapide elĉerpiĝas tiaj favorprezaj aviadilbiletoj. Se iu povas varbi kunvojaĝantojn (amikoj, familianoj, ktp), pli rapide oni povas finorganizi ĉion, kaj plej malmultekoste estos por ni ĉiuj.
Petu informojn al: Augusto Casquero. Telefonnumero: 96 3401369. Retadreso : a.casquero@eresmas.es

**UNESKO PREMIO AL ERA**
La Unesko-Centro de Eŭska Lando (UNESKO-Etxea) premiis “Esperanto"-Radikalan Asocion (ERA) por ĝia "ege rimarkinda kontribuo al la redaktado de la Monda Raporto pri la Lingvoj" - kiel oni povas legi en la letero akompananta tiun meritateston - "raporto, kiun Unesko eldonos dum la jaro 2001". Tiu raporto, konsistanta el la unua kompleta kaj oficiala studaĵo pri la "sanstato" de ĉiuj lingvoj ankoraŭ ĝis nun parolataj en la mondo, estis prizorgita, dum la lastaj jaroj, far la Centro de Bilbao. Tiu agnosko reatestas la prestiĝan pozicion de ERA inter la esperantistaj organizaĵoj, ankaŭ interne al la "sistemo UNESKO", kaj la gravecon de la kunlaborado de nia asocio kun tiu Organizaĵo.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**
Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.
Kursoj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj.
Universidad Autónoma de Madrid. Lunde kaj merkrede 12-13h.
Informas Marco Trevisán 915 617 613 marco.trevisan@adi.uam.es
Prelegoj:
19-an de marto "Madrido je bird-okuloj". Lumbildoj. Carmen Suárez
16-an de aprilo "Popularaj taŭroludoj". Lumbildoj. Lupe Sanz